

Kontribuo al kluba konversacio "Kiel mi fariĝis esperantisto" Zdeněk Závodný

Mi naskiĝis (1929-07-11) en malgranda vilaĝo de agrikulturistoj LHOTKA sub la monto Ondřejník - proksime de la urbo Frýdlant n/Ostravici.

Post la dua mondmilito en la jaro 1947 mia pli aĝa frato Čestmír (Závodný) konatiĝis kun fervora esperantistino Bartovská en Frýdek Místek kaj de ŝi li alportis hejmen lernolibreton kun vortareto de Theodor Čejka, instruisto en Bystřice pod Hostýnem.



La ideo de tutmonda komunikado per tiu ĉi relative facila lingvo, kiun mi povis parte mem ellerni dum mi vartis nian bovinon "Belfloro - Květula" sur herbejo ĉe nia domo, tuj kaptis mian intereson.

Poste en la jaro 1950, kiam mi studis je la komerca akademio en Frýdek Místek, aperis ebleco finstudi la trian kaj kvaran stud-jaron en Opava, kie tiam floris la junulara esperantista movado. Do mi tuj akceptis la proponon transiri al Opava.

Aŭtune en la jaro 1950 mi kontaktis samideanon Jaroslav Kuzník (estro de la esperantista junulara movado en Opava) kaj komencis frekventi la esperantan kurson en belega palaco kaj ne malpli bela salono. Tie mi konatiĝis kun Josef Solnický kaj Vlastimil Novobilský, kiun mi tre admiris, ĉar li eminentis ne nur en Esperanto sed ankaŭ en matematiko, ĥemio, fiziko kaj krome li ludis belege violonon.

Somere, dum ferioj en la jaro 1951 mi frekventis Esperantan kursaron en Rožnov pod Radhoštěm kaj pasis ekzamenon por progresintoj. Sekvantan jaron 1952, post mia abiturienta ekzameno, mi denove partoprenis la Someran esperantan kursaron en Rožnov pod Radhoštěm kaj pasis ekzamenon por instruantoj de Esperanto. Neforgesebla organizanto kaj oratoro estis Drahoš Kočvara. El la ekzamenistoj mi memoras seriozan Rudolf Hromada kaj senlime afablan Josef Vondroušek.

Dum ferioj, en la sama jaro 1952, mi ankaŭ partoprenis la Someran Esperanto-kolegion en Doksy (ĉe lago de Mácha), kie mi frekventis konversacian kurson. Tre populara estis Antonín Slanina per siaj prelegoj pri retoriko.

Somero de la jaro 1952 estis mia lasta jaro de junulara aktiveco kaj esperanta etoso, ĉar aŭtune mi komencis mian milit-servon, unue en Slovakio en Žilina, kie mi kiel kadeto, frekventis Instituton por militistaj intendantoj.

Poste kiel arma oficiro mi militservis en multaj garnizonoj en Bohemio. Tiam mi nur okaze agadis en esperanta movado. Iomete mi instruis en SET en Lančov kaj en la jaro 1956 en la SET en Žimrovice, ĉe la rivero Moravice, kie mi estis kun mia estonta edzino Marie (Václavíková). Okaze mi vizitadis la EK en Strakonice, en Kralovice u Rakovníka mi amikiĝis kun Vašek Miller, kiun mi konis el Rožnov, en Litoměřice mi vizitadis samideanon D-ron Černý, amiko de D-ro Hradil.



Nur kiam emeritiĝo liberigis min de mia soldata vivo, mi iom post iom ekkomencis repagi mian ŝuldon al Esperanto movado, kiel membro kaj kasisto de EK en Brno kaj membro de Societo por la Internacia Lingvo Esperanto /SILE/ en Brno - Kohoutovice, kie mi kun s-anino Baroňová esperantigis la historion de nia loĝloko Kohoutovice kaj okaze mi informadas en la loka gazeto "Kohoutovický kurýr" pri aktivitoj de esperantistoj, utilaj por la sudmoravia regiono, urbo Brno kaj por nia urboparto Kohoutovice.

Mia edzino Marie, kiel amikino de Esperanto, subtenas la movadon per siaj kroĉtrikaĵoj

/verdaj papilioj/ kaj okaze de festkunvenoj per bongustaj potkukoj.

Ĉar neniu vivos eterne, en mia naskiĝloko Lhotka sub monto Ondřejník troviĝas verda stelo sur tomboŝtono de nia familio Zdeněk Závodný.